

Ha – ha – ha ! - fonetika ekzercoteksto por vortkomenca “h”

Henriko, la hungara husaro humile atendas sian hispanan harpistinon Helga antaŭ la haga hospitalo.

Hieraŭ ili interkonsentis pri rendevuo je la kvara horo, sed ŝajne hodiaŭ ŝi ne havas tempon.

Henriko ligas sian kvar-hufan ĉevalon kaj harpunon al ĵus hakita arbo kaj heziteme foriras por aĉeti hamburgaĵon kun haringo.

Revenante, inter la homoj, li hazarde ekvidas la helbrunajn harojn de la blank-haŭta Helga kiu hastas al la hospitalo kun en sia mano la helverda hoko de hamstra kaĝo.

Estas jam la kvina horo.

Sur la humida herbejo de la hospitala parko, harmonie hokeas kun heliko hundo de huligano el Honolulu, kiu vendas haŝiŝon al la havenaj homoj.


Henriko kaj lia heroino Helga kuŝiĝas en hamakon kaj en bona humoro serĉas humurajn ŝercojn unu por la alia, aŭskultante la hindian himnon. Subite ek-hajlas. La huligano kun sia hundo hastas en la heĝon de la hotelo ‘Hirundo’, kaj la hamstro eskapas el sia kaĝo.

Helga ek-histerias. Hegemonias ĥaoso. Helikoptero de ‘Higiena Helpo’ haltigas la hororan scenon.

KONSILOJ

Parolantoj de kelkaj lingvoj (kiel ekz. la itala kaj la franca) ne prononcas la votkomencan « h », kiu restas muta. Tiuj personoj havas malfacilaĵojn en esperanto. Ili aŭ tute ne prononcas « h » aŭ eldiras ĝin tro forte.

Kiam dum kursoj mi provas klarigi tiun fenomenon, mi metas malgrandan paperpeceton sur la dorson de mia pugno kaj la celo estas eldiri la « ho-vortojn » tiel, ke la sono aŭdiĝu, sed la papereto ne forflugu (pro la forta elblovo de la aero).



Unue komencu per unuopaj vortoj.

La kursanoj mem listigu “ho-vortojn” kaj jam dum tiu listigo ni atentigu ilin pri la ĝusta prononco. Ni skribu aŭ skribigu la vortojn sur tabulon. La kursanoj provu krei frazojn el la kolektitaj vortoj.

Por ekzerco la sonon mia « *Ha-ha-ha!*-teksto » povas esti laŭtlegeta kiel resuma teksto, kaj dum aliaj fojoj kiel varmigo antaŭ lecionoj, aŭ kiel ripoziga, malstreĉiga ekzerco.

Disdonla folion al la lernantoj kaj konsilu al ili marki la literojn de la malfacilaj sonoj per forta koloro.

Kvankam el la vidpunkto de fonetika ekzerco ne vere gravas ke la enhavo estu tutkomprenebla, mi tamen konsilas, ke oni trovu tempon traduki la tekston kaj preparoli la sistakson de kelkaj frazoj (ekz. « Sur la humida herbejo.. »), la posedajn refleksivojn kaj aliajn gramatikajn « kuriozaĵojn ». Tiel simpla fonetika ekzerco, ripetita plurfoje, povas helpi fiksi en la memoro ankaŭ gramatikaĵojn.